



AKTUALAJ JURAJ KAJ TEKNIKAJ INSTRUMENTOJ DE EKOLOGIPROTEKTA POLITIKO

Stano MARČEK



ENVIRONMENTAL POLICY TOOLS '2020

ANTAŬPAROLO

En 2017 pli ol 100 miliardoj da tunoj da materialoj eniris la tutmondan ekonomion por produkti energion, konstrui infrastrukturojn kaj domojn, produkti manĝaĵojn kaj provizi konsumvarojn kiel vestaĵoj kaj telefonoj. Sur nia planedo nuntempe estas pli multaj telefonoj ol homoj, kaj oni antaŭvidas, ke ĝis la jaro 2030 la kvanto de aĉetitaj vestaĵoj atingos pli ol 92 milionojn da tunoj. Iuj pritaksoj sugestas, ke 99% de la aĉetitaj objektoj estos forĵetitaj ene de ses monatoj post la aĉeto, sen la rekupero de la materialo. La kialo estas, ke ni havas tion, kion vi povus nomi lineara ekonomio. Ĝi funkcias ĉerpante rimedojn kaj produktante produktojn, kiuj estas vendataj al homoj kaj poste fariĝas rubaĵoj post mallonga periodo de uzado.

Tamen la pandemio COVID-19 mergis la tutmondan ekonomion en ion, kio povus iĝi la plej malbona ekonomia malkresko de post Granda Ekonomia Krizo. Anstataŭ provi revivigi la sistemon, kiu estas esence malŝpara, Eŭropa Komisiono devigis sin konstrui post-pandemian daŭrigeblan cirklan ekonomion.

La ideo de cirkla ekonomio estas simpla: pli bone eluzi la fontojn, t.e. direkti la fluojn de krudaĵoj kaj materialoj de iliaj fontoj al ilia plena valorigo. Tio signifas, ke anstataŭ malŝpari krudaĵojn kaj materialojn (kaj kun tio rilata poluado de la vivmedio), necesas enfokusigi produktadon, loĝistikon kaj komercajn procedojn de ekologia projektado (tiel nomata ekodezajno) de produktoj al ilia longdaŭra uzo kaj sekve al ilia plej bona kaj efika valorigo.

Tutmondaj sistemaj tendencoj kaj defioj, ligitaj kun la demografia dinamiko, urbanizado, malsanoj kaj pandemioj, progresantaj ŝanĝoj de teknologioj kaj la nebremsebla ekonomia kresko kontribuas al situacio, ke solvoj de ekologioprojektaj problemoj kaj atingoj de daŭripova evoluo estas komplikaj. Por certigi longtempan prosperon necesas akcepti decidojn, por solvi ĉi tiujn problemojn.

Spertoj kun la kriterioj, evoluigitaj en libervolaj politikoj, povus esti adaptitaj tiel, ke ili helpu ellaboron de devigaj kriterioj. Por la estonta evoluo estos grava precipe ligo inter la produktaj kaj la sistemaj kriterioj.

Eŭropaj regularoj provizas dinamikan kadron por produktaj politikoj, por plibonigi ekologioprotektajn parametrojn de produktoj dum ilia vivociklo. La politiko de Eŭropa Unio estas fleksebla tiel, ke ĝi povu adaptiĝi al ŝanĝiĝantaj kondiĉoj de teknologioj kaj merkatoj. Iliaj postuloj kaj kriterioj estas reviziataj, por ke ili reflektu teknikajn novigojn, kiel ekz. evoluigo de materialoj, teknologioj kaj produktadaj procezoj. La amplekso de produktaj politikoj estas kontinue reviziataj kun la celo trakti koncernajn novajn produktajn grupojn. La politika kadro de la produktoj de Eŭropa Unio estas ilia potenca komplementeco, certigado de sunenergioj kaj venkado de potencialaj nekonsekvencoj. "Plano por Eŭropo efektive eluzanta fontojn" (COM (2011) 571), kiu estas parto de la strategio Eŭropo 2020, postulas daŭripovan konsumon kaj produktadon ĝis la jaro 2050, kaj proponas uzi libervolajn kaj devigajn aranĝoj por pluraj produktoj kaj servoj.



Dum la procezo de projektado de produktoj, krom teknikaj, ekonomiaj kaj komercaj postuloj, ekologioprotektaj aspektoj fariĝis ne nur la aldonita valoro, sed ankaŭ la postulo. La propono havas fortan efikon al ekologioprotektaj influoj en sekvaj fazoj de la produkta vivociklo, ekz. produktado, distribuado, uzado kaj fino de ilia vivo. Se ĉi tiuj influoj estas antaŭvidataj kaj konsiderataj en frua dezajnostadio, estas facile plibonigi la ekologioprotektajn ecojn de produktoj. Tial pluraj regularoj de Eŭropa Unio instigas produktantojn krei produktojn, konsiderante ilian kompletan vivociklon. Antaŭvidi estontajn ekologioprotektajn postulojn, ofte kondukante la kompaniojn al konkurencaj avantaĝoj.

Klopodoj por elimini malfavorajn efikojn de la homaj aktivecoj, kaŭzantaj seriozajn ekologioprotektajn problemojn, lastatempe koncentriĝas al efektivigo de la t.n. volontulaj proekologioprotektaj politikaj instrumentoj. Globalaj mediprotektaj problemoj havas daŭre malboniĝantan tendencon, ekzemple malaperas naturaj arbaroj de la milda klimato, subtropiko kaj tropiko, ŝrumpas agrikultura grundo rezulte de ĝia degenerado, kreskas mara poluado, detruigas la vundeblaj maraj ekosistemoj, nehaltigebla malaperas plantaj kaj bestaj specioj.

Temaro de la daŭrigebla evoluo estas inter la prioritatoj por atingi internacian kunlaboradon por solvi internaciajn problemojn de la ekonomia, socia, kultura aŭ humaneca karakteroj, kaj ĉe subteno kaj stimulado al respekto de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiuj, sendepende de la raso, sekso, lingvo aŭ religio.

Por ke la disvolviĝo havu longtempe pozitivan efekton, ĝi devas havi daŭripovan evoluon. Daŭripova evoluo parolas pri la klopodo certigi, ke la fontoj de la Tero, kiujn ni uzas por la ekonomia kresko, estu alireblaj ankaŭ por la estontaj generacioj. La atento, kiu estas nuntempe dediĉata al la minacoj de la tutmondaj klimataj ŝanĝoj, estas ekzemplo, kiel la homa libereco kaj la homa evoluo povas esti rompita, kiam la interesoj de la ekonomia kresko kaj disvolviĝo estas apartigataj de la ekologioprotektaj interesoj. Solvo de la nuntempaj ekologioprotektaj problemoj estas ne nur demando de la teknika solvo, kiu ĝis antaŭ nelonge ekestis aŭ kiel reago al la ekestinta ekologioprotekta problemoj, aŭ kadre de la pli progresema aliro kiel la preventa. Ĝi devus esti ŝanĝo de la valora orientiĝo de la homo kiel individuo, sed ankaŭ de la socio kaj de la tuta homaro.

La ĉefa celo de la daŭrigebla evoluo estas garantio de la ekologioprotekta, socia kaj ekonomia daŭrigeblo de la kresko, kun aparta emfazo al la protektado kaj plibonigo la vivmedio, konsiderante la principon "la poluanto pagas".

Lastatempe, kadre de la klopodoj de la ekologioprotekta politiko, okazis elstara vastigo de la spektro da ekologioprotekte orientitaj libervolaj aliroj. Aperas tendencoj al multigo de la instrumenta diverseco, bazita ne laste sur libervola porekologioprotekta agado de la produktantoj, en la kreskanta mediprotekta konscio de ĉiuj interesiĝintoj. Pluraj procedoj estis laŭgrade standardigitaj. Samtempe kun ilia praktika disvastiĝo komencis pasi ilia esploro, koncentrita ne nur al esplorado de la teoriaj aspektoj, sed ankaŭ al la ĝeneraliĝo de praktikaj spertoj, akiritaj dum la unuopaj studoj.

Ekologioprotekta manaĝerado prezentas aron da libervolaj instrumentoj de la vivmediprotekta politiko, kiuj ebligas enkondukon de la sistema aliro al problemsolvado kadre de vivmedia protektado kaj daŭra kondutpliboniĝo de la organizaĵoj.

EMS, EMAS, la ekologioprodukta produktmarkado, la verda publika prizorgado, estas ekzemploj de libervolaj instrumentoj, aplikeblaj sur la kampo de la vivmedio, tio signifas, ke ili ne estas leĝe devigaj, nek motivitaj de ajna formo de stimulado, ilia neaplikado ne estas punebla. Temas pri instrumentoj de preventa strategio, realigata en formo de aranĝoj, faritaj por redukti median polucion.

Konforme al klopodoj pri strategio de proaktivaj kaj prodaŭripovaj ekologioprotektaj aliroj iompostiome aplikiĝas klopodoj pri transiro de solvado de mediprotektaj problemoj post ilia ekesto al solvoj por teknike preventaj kaj daŭrigeblaj en la tuta vivociklo de ilia teknologio kaj produkto. Ekologia protektado dinamike evoluas kaj fariĝas decida konsistaĵo de la vivo de la socio. Iom post iom ŝanĝiĝas la konduto de la produktantoj kaj konsumantoj kaj per kreskanta mezuro aplikiĝas principoj de preventado, libervola kaj publika partopreno en traktado de vivmediaj problemoj. Realigas sistemoj de ekologioprotekta direktado de industria kaj produktaj agadoj, pli grandan atenton oni dediĉas al influoj de la produktoj mem (kiel produktoj de konsumado, duonproduktoj kaj materialoj) al la vivmedio.



Celo de la konferenco "Instrumentoj de ekologiprotekta politiko en 2020", okazinta la 30-an de januaro 2019 en Bratislava, estis disponigi taŭgan platformon por informi la profesian kaj akademian publikojn, reprezentantojn de la loka registaro kaj la ŝtata administrado, interŝanĝo de spertoj kaj prezento de novaj rezultoj en la problemaro de manaĝerado de la vivmedio.

Stano MARČEK

Zvolenská 15/21, 036 01 Martin, Slovakio

Redaktoro de la revuoj *Juna Amiko* kaj *Esperanto aktuell*

Membro de Akademio de Esperanto

e-mail: Stano.marcek@gmail.com